# *Raúl Castro kaj Rafael Correa dialogos ?i-vendrede en Havano.*



Havano, 5 maj (RHK) La kuba prezidento Raúl Castro, akceptos ?i-vendrede sian homologon ekvadoran, Rafael Correa kaj amba? efektivigos oficialan dialogon en la kunteksto de la vizito al Kubo.

Correa, prezidento de Ekvadoro ekde 2007, estos investita per la ordeno José Martí, la plej alta distingo kiun donas la ?tata Konsilantaro de Kubo al  eksterlandaj personecoj pro ties kontribuo al la paco. ?in oni kreis en 1972.

La ekvadora ?tatestro, anka? oma?os la nacian heroon José Martí  en  ties Memorialo situanta ?e la Placo de la Revolucio; lin oni anka? distingos per la titolo Honordoktoro de la Havana Universitato.

Correa anka? vizitis la teknikan universitaton José Antonio Echeverría en Havano kaj dialogis kun la studentaro; li komencis sian viziton tra la orienta provinco Santiago de Kubo kaj tie oma?is la nacian heroon José Martí kaj la historian revolucian gvidanton Fidel Castro en la tombejo de Santa Ifigenia.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/129004-raul-castro-kaj-rafael-correa-dialogos-ci-vendrede-en-havano

# Radio Habana Cuba